

BULTENO DE REU

N-ro 83, Januaro 2016



Karaj geamikoj!

La Estraro de REU kore gratulas vin, viajn klubanojn, familianojn okaze de la veninta Nova 2016 Jaro! Estu ĝi plensukcesa, paca, riĉa je novaj realaj ideoj kaj eventoj sur tuta teritorio de nia vasta lando!

En la periodo inter la lasta REU-Konferenco (julie 2015, Ĉuvaŝio) ĝis la fino de la kalendara jaro pasis sufiĉe interesaj aranĝoj en niaj regionoj: TILE en Soĉi, la XX-a Lingva Festivalo en Ĉeboksaro, Zamenhof-Tagoj en preskaŭ ĉiuj urboj, jubileoj de la kluboj en Krasnojarsko kaj Tiĥvin, la X-a Lingva Festivalo en Moskvo k.a.

5 esperantistoj partoprenis la unuan en Rusio BRIKS-Konferencon, kiu pasis surbaze de la Rusia Akademio de Sciencoj, okazis 3 elpaŝoj (G.M. Ŝilo, M.Ĉertilov, V.Seguru). De la nomo de REU estis farita propono por la Rezolucio de la Konferenco, kie temis pri "...kreo de la koncerna Komitato en la registaroj de BRIKS-landoj pri eventuala uzo de Esperanto en sekvaj tutmondaj eventoj".

En REU ekde la 01.01.2016 ekfunkciis nova kasisto **Aleksandr LEBEDEV**, al kies banka karto eblas ĝiri membrototizojn. En la 2016 jaro la kotizoj restas la samaj: 200 rbl por la klubanoj jare, 250 rbl por individuoj, 500 rbl (eblas pli) por mecenatoj, 5.000 rbl por dumvivaj membroj.

Numero de la karto jenas: **5469 3800 7074 4643**, yandex-monujo **41001363815184**.

Samtempe kun la pago bonvolu informi Aleksandron rete amikko@yandex.ru aŭ telefone **89853852181** pri nomo(j) kaj la sumo(j). Anonimaj pagoj estos konsiderataj kiel donaco al REU. Karaj, bonvolu ekpagi la kotizojn por la nuna jaro!!!!

Dankon al Aleksandro pro lia konsento okupi ne tre facilan kaj fakte tute sendankan postenon!

Laŭ la decido de REU-Estraro (28.12.2015) pro multjara senlaca brila laboro rilate organizadon kaj efektivigon de la Lingvaj festivaloj en Ĉuvaŝio **Aleksandr BLINOV** estas elektita kiel esperantisto de la Jaro 2015 en Rusio kaj estas premiata per la jarabono de la "Beletra Almanako". Gratulojn kaj plurajn sukcesojn!

Pro malaktiveco kaj senkaŭza nerespondo al ĉies alvokoj kaj mesaĝoj el la REU-Estraro estas eksigita Ekaterina Alekseeva. Do, la posteno de REJM-responsulo denove vakas...

Bonvolu aliĝi al Krimeaj Esperanto-Tagoj (**KET**), kiuj okazos inter la 12-20 de julio 2016. La ĉeforganizanto estas Krimea E-Centro kunlabore kun REU. Invitataj estas ĉiuj ne nur partopreni, sed ankaŭ programkontribui! La aliĝilo aperis en la paĝaro de REU.

La Bulteno de REU (BdR) atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru aŭ/kaj Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio

KET

Krimeaj Esperanto-Tagoj

12-20.07.2016



Informletero 1

Tempo: KET okazos inter **12 kaj 20-a de julio 2016**, post BET en Litovio (2-10.07) kaj antaŭ UK en Slovakio (23-30.07). Dezirantoj ripozi en Jalto pli longe povos ekloĝi en la komunloĝejoj pli frue kaj resti post la tendaro.

Loko: Komunloĝejo de Jalta Komerc-Ekonomia Kolegio, kie en aŭgusto 2012 okazis 85-a SAT-Kongreso kaj en julio 2013 IJK-postkongreso en kadroj de "Velura Sezono-16", **Adreso:** Стахановская ул. 13, общежитие, Массандра, Ялта, Россия

Loĝado: en blokoj kun necesejo kaj duŝejo: 2 ĉambroj 2-lokaj kaj 2 ĉambroj 3 aŭ 4-lokaj. Kosto de loĝado por unu persono estos ĉ. 300 rubloj tage (la plej malmultekosta en Jalto julio).

Manĝado: Ĉar somere studentoj ne lernas, speciale por la partoprenantoj funkcios studenta nemultekosta manĝejo

Programo: E-kursoj, Somera universitato, Arta programo, Rondaj tabloj, ekskursoj, kontribuoj de la partoprenantoj. Jalta E-teatro kaj koncerto de Pavel Moĵajev. Pli plena informo aperos en sekvaj informletero post ankaŭ viaj konsiloj kaj proponoj.

Aliĝkoto: 500 rub.; por gejunuloj (malpli aĝaj ol 31 j.) — 200 rub.

Informo pri pagmanieroj aperos en sekvaj informletero post iom da tempo.

Al KET ni invitas esperantistojn el Rusio, Ukrainio, Belorusio kaj aliaj landoj. La aranĝon preparas Krimea E-centro, tamen ni bonvenigas alialandajn esperantistojn partopreni preparadon kaj eĉ organizadon de la aranĝo.

<http://reu.ru/kalendaro/eo/KET>

Eventoj

Regiona agado en 2015

En la jaro 2015 plej vigla REU-agado okazis en:

- Rusiaj aŭtonomaj respublikoj: Tatarstana, Ĉuvaŝia kaj Krimeo;
- Rusiaj regionoj: Krasnojarska, Novosibirska, Tomska, Ĉeljabinska, Jekaterinburga, Nijnij-Novgoroda, Moskva, Krasnodara;
- federacia urbo Moskvo.

Regiona agado de REU okazis ankaŭ en aliaj rusiaj regionoj kaj respublikoj, sed en tiuj regionoj kaj respublikoj ĝi estis malpli rimarkebla.

Tiuj rusiaj e-istoj, kiuj interesiĝas pri la regiona agado de REU, bv. turni vin al mi.

Feliĉan Novan Jaron al ĉiuj aktivaj esperantistoj!

Vladimir MININ,
Komisiito de REU pri la regiona agado,



La 20-a Internacia Lingva Festivalo en Ĉeboksari

La 24-an-25-an de oktobro 2015 en la ĉefurbo de Ĉuvaŝio pasis la jubilea – 20-a – Internacia Lingva Festivalo, krome, ekzistis ankaŭ la anticipa programo ekde la 21-a de oktobro, konsistinta el tiel nomataj “lingvaj karavanoj” al diversaj lernejojn. Kiel kutime, la ĉefaj eventoj estis la lingvaj prezentoj kaj internacia koncerto. Kompreneble, inter la 57 prezentoj de diversaj lingvoj kaj lingvaj specifaĵoj havis lokon prezento de Esperanto, kiu okazis kvar fojojn fare de Irina Gonĉarova (Moskvo), Aleksandr Blinov (Ĉeboksari), Massimo Ripani (Novoĉeboksarsk) kaj Svetlana Smetanina (Moskvo). Gratulojn al Aleksandr Blinov, la ĉefa motoro de la Lingvaj festivaloj, pro la neordinara sukcesa dudekjara laboro!



La 10a Moskva Lingva Festivalo en la 20-jara MASI-historio

Ni, Esperanto-agantoj, iĝas feliĉaj, kiam ni rikoltas sukcesojn sur nia vojo al amikeco inter popoloj, al paco kaj justaj homaj rajtoj. Ni estas feliĉaj, kiam ni allogas per niaj aktivecoj aliulojn, kiuj admire mergiĝas en nian atmosferon de la intereso pri diversaj kulturoj kaj reciproka estimo al diversaj gentoj. Ni estas des pli feliĉaj, kiam la partoprenantoj konsciigas, ke tiun atmosferon de komuna solidareco nun kaj ĉi tie kreas esperantistoj — la vivaj posedantoj de la vivanta lingvo — la dua post la gepatra kaj komuna por ĉiuj.

Ĝuste tiun feliĉon jam la dekan fojon organizas por si kaj por ĉiuj alvenantoj la Moskva Esperanto-Asocio MASI, organizante la lingvajn festivalojn.

La jubilea Moskva Lingva Festivalo (MLF-10) okazis la 20an de decembro 2015 en la Rusia Ŝtata Scienca Universitato (RGGU). Kaj...Nenio speciale raportinda! La sama kvanto da programeroj, kiel dum la kelkaj lastaj MLF — ĝuste 100: 70 lingvoj, 20 prilingvistikaj prelegoj, 10 praktikaj, kelkaj nekalkulindaj distraĵoj. La sama kvanto da kontribuantoj — 130: 100 prelegantoj, 20 organizantoj, 10 artistoj kaj nekalkulebla kvanto da volontuloj. Ĉirkaŭ 1000 vizitintoj. 10 laborhoroj tra la tuta dimanĉo, inkluzivantaj la malfermon kun la parado de la instruantoj, 7 lernoblokojn po 15 lecionoj, la fermon kun la koncerto kaj enmanigo de la diplomoj al ĉiuj kontribuantoj. Trifoja prezentado de Esperanto fare de diversaj instruistoj, unu prelego pri Esperantujo, ĉiamfunkcianta stando kun Esperanto-filmetoj kaj interaktiva fotoekspozicio Mía Vorto, flugfolioj kun reklamo de Esperanto-eventoj, grandaj sloganoj pri Esperanto en la koncerta salono kaj multfoja menciado de esperantistoj dum la malfermo kaj fermo.

Tamen estis kelkaj specialaĵoj. Ekzemple, dum la malfermo la salutvideoj de Dennis Keefe el Florido, de la LF-organizantoj el Sidnejo kaj de LF-aspiranto Syauqi Styta-Lacksana (Uki) el Indonezio, ankaŭ la vivaj gratuloj de la direktoro de la Instituto pri lingvistiko ĉe RGGU d-rino Nina Sumbatova kaj de la lanĉinto de LF en Rusio Aleksandr Blinov. La agrablaj momentoj, kiuj solenigas kaj riĉigas la ĝeneralan etoson kaj fortigas la Esperantan akcenton...

Iuj povus trovi en mia priskribo signojn de stagnado kaj laciĝo: dum tiom da jaroj nenio nova?! Kial ni, la organizantoj, mem ne tediĝas pro tiu rutino? Ĉu ne venis la ĝusta momento anonci la Festivalon finita? Mi mem ne sukcesas finformuli la demandon, ĉar mi ja scias la respondon. Mi spertas ĝin. Ĉiujare kaj ĉiufoje novaj prelegantoj proponas siajn prelegojn pri lingvoj kaj lingvistiko, novaj entuziasmaj aktivuloj aliĝas al la organiza teamo, novaj ardaĵoj volontuloj venas por helplaboroj, novaj centoj kaj centoj aliĝas kiel gastoj... Denove kaj denove ni aŭdas admirajn dankojn — kaj sinproponojn por kontribuoj... Sur tiu ĉi fono ĉesi ne endas! Ĉiu festivalo nur aldonas al la organiza teamo la novan entuziasmon! Sur tiu ĉi fono eblas nur pensi pri plialtigo de la kvalito, pri iomaj modifoj de organizaj formoj, pri ŝanĝoj de la strukturo... Kaj pri novaj tiaspecaĵoj aranĝoj. Ĉar en mia dudekjara sperto de la Esperanto-aktiveco ekzistis nenio tiel alloga, tiel amasa kaj tiel sukcesa por popularigo de Esperanto inter la ĝusta, multnombra kaj danka publiko, kiel la Moskva Lingva Festivalo. Do — daŭron kaj longan gloran vivon al MLF!

La 11a Moskva Lingva Festivalo okazos la 30an de oktobro 2016 en la Rusia akademio de ekonomio kaj ŝtata servo ĉe la Prezidento de la Rusia Federacio (Российская академия народного хозяйства и государственной службы при Президенте Российской Федерации)

*Irina Gonĉarova, kunordiganto de MEA MASI, direktoro de MLF
Laŭ "La Balta Ondo", <http://sezonoj.ru/2016/01/masi-16/>*

Esperantistoj en BRIKS-landoj scienca konferenco

La 2-3 de novembro en Moskvo en domo de Rusia Akademio de Sciencoj okazis unua internacia scienca-praktika konferenco "Landoj de BRICS: strategio de evoluo kaj mekanismoj de interagado kaj kunlaboro en ŝanĝanta mondo". REU estis unu el la partoprenantoj.

Inter la ceteraj temoj pridiskutitaj dum la konferenco estis diskutita ebla rolo de Esperanto en BRICS-landaro. Tio okazis en kadre de sekcio "Nacia kaj civilizacia identeco de landoj de BRICS, internaciaj rilatoj kaj problemoj de interkultura komunikado".

La diskuto okazis surbaze de tri faritaj prelegoj de esperantistoj: Gennadij Ŝilo "Ĉu la estonteco de BRICS sen la angla?", Renato Corsetti kaj Mikaelo Ĉertilov "BRICS: Grandaj kulturoj kaj iliaj bezonoj pri komunikado", José Afonso de Sousa Camboim kaj Valentin Seguru "BRICS – problemoj de interkultura komunikado". Krom la prelegantoj partoprenis la prezidanto de REU Svetlana Smetanina kaj la gvidanto de moskva Esperanto-asocio "MASI" Irina Gonĉarova.

Entute la partoprenantoj favore rilatis al la temo. Je nomo de Rusia Esperantista Unio estis farita propono por rezolucio de la konferenco.

La prelegoj estos publikigitaj en formo de sciencaj artikoloj kiel materialoj de la konferenco en unu el la retejoj kaj revuoj de la akademio. La artikolo de Corsetti kaj Ĉertilov eblas preni en http://reu.ru/prenu/artikolo_corsetti_chertilov.doc.

Indas rimarki ke dum la diskuto REU ricevis proponon flanke de la Instituto de scienca informado pri sociaj sciencoj ĉe Rusia Akademio de Scienco pri probabla kunlaboro.

Mikaelo Ĉertilov

TILE-9

La 30-an de oktobro – la 7-an de novembro 2015 en Soĉi (Rusio) sukcese pasis "Tagoj de Internacia Lingvo Esperanto – 9" (TILE-9). Kelkaj partoprenintoj daŭrigis la aranĝon eĉ la 8-an de novembro.

La aranĝon partoprenis 30 e-istoj el 12 urboj de Rusio: el Soĉi – 9, el Jalta (Krimea Respubliko) – 6, el Uljanovsk – 3, el Taganrog, Vladimir kaj Volgodonsk – po 2, el Arĥangelsk, Tomsk, Moskvo, Krasnodar, Gelendjik kaj Brjansk – po 1. (12 viroj kaj 18 virinoj)

En la programo okazis ronda tablo pri E-agado en Rusio, prelego de Jefim Zajdman pri la stato de Krimeo antaŭ kaj post ĝia aliĝo al Rusio, metiejo de Jefim Zajdman pri produktado de artaĵoj el ŝtonoj, renkontiĝo kun lokaj bardoj kaj interkonsento kun ili pri kunlaboro, vizito al la muzeo de Nikolao Ostrovskij, vizito al la arta kaj historia muzeoj, vizito al Rusa Geografia Societo kun ĝia minerala muzeo, vizito al "Arbo de Amikeco", vizito al "Parko Rivjera", vizito al la orgena halo, vizito al koloraj fontanoj, ekskursoj al Roza Ĥutor/Krasnaja Poljana, al la Olimpika Parko, al la taksusa-buksa parko, al Nuksaj (Ореховые) akvofaloj, partopreno en la mitingo okaze de la 98-a datreveno de Granda Oktobra Revolucio la 7-an de novembro, diskutrondo pri la degeneriĝa fiagado de la ukrainaj naciistoj dum jardekoj, kiu (la fiagado) kondukas Ukrainion ĝis ĝia kompleta kolapso kaj fiasko.

Plej bone impresis la partoprenintojn la solenaj malfermo kaj fermo de la aranĝo, multaj promenoj en la urbo tage kaj nokte, kiujn gvidis nelacigeblaj sociaj esperantistinoj Irina Borisovna Poliŝĉuk kaj Larisa Soniĉeva. Vadim Solovjov el la urbo Vladimir sonigis variajn registraĵojn de E-kantoj al la partoprenantoj, mem gitarludis kaj kantigis la esperantistojn en Esperanto. Vladimir Minin instruis kartludon — preferancon, grandan kaj tablan tenison al partoprenantoj kaj praktikis kun ili tiujn ludojn.

Vladimir Minin

Esperantistoj gajnis en “Propra ludo”

27 dec 2015 okazis tradicia XI ĉampionado de moskva klubo "Nesprosta" pri "propra ludo" (por alilandanoj indas klarigi: tio estas rusa versio de anglalingva ludo "Jeopardy!")

La ĉampiono iĝis fama sciulo Anatolij Vasserman. Verŝajne ĉiu, kiu iom regule kaj longe TV-spektas intelektajn ludojn, konas tiun intelekt-fenomenulon. Tamen ne multaj scias, ke li ja regas Esperanton.

En mia unua intelektluda festivalo (Tula, 1992) mi sukcesis "eltiri el li" tri longajn komplikajn frazojn en absolute senerara Esperanto... poste li diris pardonpete, ke li "pro la pigreco" ne povas okupiĝi pri Esperanto sisteme.

Reale, certe, kulpas ne pigreco, sed okupiteco pri multaj aliaj aferoj kaj ŝatokupoj...

La duan lokon gajnis konata Esperanto-aktivulo Viktoro Aroloviĉ – al rusiaj Esperantistoj ne necesas lin prezenti. Li, male, pli famas en Esperanto, sed ankaŭ intelektajn ludojn partoprenas regule (iam mi dum jaro ludis kun li en unu sama teamo de "Kio?Kie?Kiam?")

Do, gratulon al ambaŭ!

La raporto (certe, ruslingva) kun fotoj videblas:

<http://klub-nesprosta.livejournal.com/147596.html>

Valentin Melnikov

“Radio Esperanto” el Kaliningrado

La 6an de decembro, la unuan vintran dimanĉon de 2015 aperis la 35a podkasto de “Radio Esperanto” el Kaliningrado (Rusio), kiun, kiel ĉiam, kungvidas Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov.

En ĉi tiu programo:

1. Enkonduko
2. Hilda Dresen: “Vintro” (Halina Gorecka)
3. Esperanto-novaĵoj
4. “La Ondo de Esperanto”, 2015, №12
5. Zamenhofa Tago 2015
6. Kanzono de Manŭel

La programo daŭras 21 minutojn. Amplekso: 20 Mbajtoj.

La 35a sonprogramo de “Radio Esperanto” estas aŭskultebla kaj elŝutebla ĉi

tie: <http://sezonoj.podfm.ru/esperanto/22/>

Rekta ligo por elŝuto de la 35a programo:

http://sezonoj.podfm.ru/esperanto/22/file/podfm_sezonoj_esperanto_35.mp3

Aŭskultu ĉi tiun kaj plurajn el la pli fruajn elsendojn de “Radio Esperanto”

rete: <http://sezonoj.podfm.ru/esperanto/>

aŭ abonu ilin: <http://sezonoj.podfm.ru/esperanto/rss/rss.xml>

La organizantoj de la 52aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiuj okazos la 2-10an de julio 2016 en Birŝtonas (Litovio), decidis aperiĝi en la novaĵretejo La Balta Ondo informojn pri ĉiuj BEToj, kiuj okazis en Litovio. Post la materialo pri BET-3 (Molėtai, 1961) nun sekvas prezento de BET-6 kiu okazis en aŭgusto 1964 en Veisiejai kun 153 partoprenantoj. Ĉi tiu materialo enhavas tri artikol(et)ojn kaj ok fotojn.

<http://sezonoj.ru/2015/09/bet-13/>

Tiĥvina Esperanto-klubo – jam 40!



La tempo galopas antaŭen. La lastaj kvin jaroj eĉ ne galopis, sed flugis kun avia rapideco. Kun devo rakonti pri la klubo, sed sen deziro la duan fojon fari laboron jam faritan, mi prezentu al vi la historion, verkitan por la 35-jara jubileo. Certe, la iamaj legintoj jam forviŝis ĝin el la memoro, sed la nova generacio esperantista eĉ ne legis. Supozindas do, ke la historio, provizita per konvena suplemento pri la jaroj 2010 – 2015, estos interesa por ĉiuj.

Genezo

La honora civitano de Tiĥvin, Nikolaj Zverev, forpasinta antaŭ nelonge en la aĝo de 93 jaroj, ĝis sia forpaso restadis fidela membro de Tiĥvina Esperanto-klubo. En siaj rememoroj li rakontis pri kurso de Esperanto, kiun en la dudekaj jaroj de la pasinta jarcento organizis en la urbo iu eksa maristo de la Baltia ŝiparo. Tiutempe regis la opinio, ke Esperanto estas nepre bezonata por la proletaro, kiu uzos la lingvon por komunikiĝi kun alilandaj laboristoj post la venko de la monda revolucio.

Poste mem la ideo pri la monda revolucio iel degelis; anstataŭ tiu venis la Granda Purigo de Stalin, la Dua mondmilito – la eventoj ne tro favoraj por Esperanto. Tiel-aliel, la lingvo reaperis en Tiĥvin ekde 1972, kiam estis organizita rondeto en unu el la urbaj mezlernejoj. Sed Esperanto-klubo, tiam nomita la urba klubo de internacia amikeco, oficiale sin anoncis en aŭtuno 1975, iĝinte unu el gravaj kunvenejoj kaj distrejoj por la urba junularo.

La unua jardeko

Dekomence la klubanoj ricevis kunvenejon – klasĉambron en la urba kulturdomo. La direktorino de la kulturdomo entuziasme subtenis ĉiujn klubajn iniciatojn kaj mem proponis presi por la laborezono 1975-76 programlibreton, similan al tiuj, kiujn havis aliaj kolektivoj de la kulturdomo. Ŝajnas stranga, ke la leningrada cenzorejo (OblLit), permesinta kelkajn artikolojn pri internaciisma agado de Tiĥvinaj esperantistoj en la loka gazetaro, malpermesis publikigon de la programlibreto pro la vorto “Esperanto” abunde menciata tie. Nu, post anstataŭo de la krima vorto ĉiuloke je “internacia lingvo”, OblLit subskribis la permeson kaj la libro estis presita. La klubo agis, obeante la publikigitan programon kaj eĉ pli. Do estis organizitaj kelkaj prelegoj por neesperantista publiko, leterekspozicio, Esperanto-kurso por komencantoj, interesaj klubkunvenoj, vizitataj eĉ de kelkaj komsomolgvizitantoj urbaj kaj uzinaj. La filio de la fama leningrada uzino “Kirovec” estis tiam la urboformanta entrepreno kun 14 mil laborlokoj (pli ol 60% de la urba labormerkato); preskaŭ ĉiuj klubanoj oficis ĝuste en tiu filio. Uzante tiun pretekston, tiama kluba prezidanto Aleksandro Kogan sukcesis ricevi de la uzino konstantan klubejon – duonon de kvarĉambra apartamento en la unua etaĝo de unu el la novkonstruitaj multetaĝaj loĝdomoj. La aliajn du ĉambrojn okupis la uzina fotoklubo, kun kies estraro kaj membroj la esperantistoj havis stabile kamaradecajn kaj interhelpajn rilatojn. La uzina sindikata komitato, alte aprezanta la iniciatojn de la klubo, proprakoste provizis la ejon per necesa meblaro, bezonataj iloj, paperaĵoj ktp, eĉ per telefono kun aparta numero, kio estis tiuepoke speciala luksaĵo.

Sed la klubo, kel membro de SEJM havis tiam unu pli ambician planon – antaŭ la oficiala fondiĝo, en 1974 ĝi estis proponinta sin kiel klubo-kandidato por SEJT-18 en 1976. Ankaŭ tiu plano estis sukcese evoluanta kun helpo kaj subteno de ĉiuj urbaj instancoj – ĝis subita malpermeso de SEJT flanke de la regiona partia komitato, frapinta la klubanojn du semajnojn antaŭ la aranĝo mem. Malgraŭ la malpermeso tiĥvinaj esperantistoj kun helpo de la tuta SEJM

sukcesis dece organizi la tendaron kun partopreno de ĉ. 300 gesamideanoj el la plejmulto de la landaj kluboj.

La vica strangaĵo estis, ke pro neglekto de la altranga malpermeso la urba kulturkomitato forpelis la esperantistojn el la kulturdomo, sed la komsomolaj kaj sindikataj estroj de la uzino “Kirovec” neniom subtenis la persekutojn, do la klubo restis en sia ejo kaj kun ne malgrava financa subteno de la sindikato.

La sekvantaj jaroj plenis je diversaj iniciatoj kaj aktivajtoj. Ĉiujare funkciis Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj. Grupeto de lingve fortaj klubanoj tre aktive okupiĝis pri terminologio, kunlaborante kun la ĉeftermnologiiisto de UEA, kanadano Rudiger Eicholz. La klubo preparis por la urbo kelkajn internaciajn ekspoziciojn, inter kiuj specialan atenton de la urbanoj logis la ekspozicio de infandeseĝnaĵoj. Tiutempe naskiĝis ankaŭ la tradicioj pri kelkaj klubaj festoj kaj elurbigoj; ankaŭ komunaj vojaĝoj al la enlandaj aranĝoj formis amikiĝintan kernon de la klubo.

Endas diri, ke la klubo estis tre aktiva membro de SEJM, per siaj aktivecoj atingante altajn lokojn laŭ la rezultoj de ĉiujara interkluba “socialisma” konkurado. Sed la dissolvo de SEJM ne tro influis la tiĥvinanojn – la klubo plu daŭrigis sian normalan vivon kaj agadon.

La dua jardeko

Kompreneble, ekzistante kaj funkciante ene de la lando, la klubo travivis ankaŭ ĉiujn bonojn kaj malbonojn, trafintajn la ŝtaton en tiu epoko.

Uzante aperintajn avantaĝojn de la “perestrojko” tiĥvinanoj aktivigis la agadon. Dum la lastaj jaroj de Sovetio, dank’ al klubaniĝo de kelkaj muzikistoj, unuavice – Vera Vlasova kaj Slava Rajsĥkij, aperis kluba ensemblo de politika kanto, kiu furore prezentadis sin en diversaj urbaj festoj kaj dum la vojaĝoj. La klubanoj vigliĝis vojaĝante al diversaj eksterlandaj aranĝoj, ekzemple al laborbrigadoj en Jugoslavio kaj Bulgario, eĉ al UK-oj. Dum eko de ĝemelurbaj ligoj inter Tiĥvin kaj Imatra (Finnlando), ankaŭ inter Tiĥvin kaj Herouville (Francio) esperantistoj estis inter la iniciatintoj kaj la unuaj kontaktantoj kun la ĝemelurbanoj. Vizitinterŝanĝo de esperantistoj eĉ donis palpeblan helpon al la urbo: per zorgoj de la francaj esperantistoj la urbo ricevis donace plaston por forcejoj de la urba legomprodukta entrepreno “Vesna” kaj veturilojn por infanoj-handikapitoj, entute ne troveblajn en Sovetio-Rusio.

La plej dolora okazintaĵo estis, certe, perdo de la klubejo. La pereanta giganto – uzino “Kirovskij” forĵetis ambaŭ klubojn – esperantistojn kaj fotistojn – surstraten, luiginte la apartamenton kiel oficejon al iu komerca firmao. La klubo ne restis entute sen ejo – la urbestro disponigis senpagan ejon por kunvenoj kaj kursoj en la nova kulturpalaco. Sed tie mankis loko por la kluba biblioteko kaj arkivo. Ĉiuj paperoj, fotoj, libroj, ilaro trafis portempe en privatan somerdomon, kie multo perdiĝis aŭ difektiĝis senrevene.

Eble mi ne ĉion gravan rakontis pri la jardeko, ĉar plejparton de tiu mi pasigis ekster Tiĥvin, laborante en Nordo.

Bonŝance, la kerno de la klubo restis laborema kaj daŭrigis la agadon malgraŭ la sortobatoj.

La tria jardeko

Iel-tiel la kursoj de Esperanto funkciadis en la urbo ĉiujare, sendepende de la enlanda kaj enurba situacio, donante al la klubo iom da freŝa forto. Bedaŭrinde, plejmulto de la kursfinintoj – pliaĝaj lerneĵanoj kaj studentoj – forlasis la urbon por serĉi pli bonan sorton en Peterburgo kaj aliaj pli laborriĉaj lokoj.

Ve, ne nur ĝejnuloj... Estis la jardeko de la unuaj gravaj perdoj: foredziĝis eksterlanden la kluba prezidinto Saŝa Kogan, formigris suden la ĉeftermnologiiisto Volodja Gakalenko, forpasis subite nia kantisto Slava Rajsĥkij...

Tamen la klubo plu restadis aktiva, kunvenante, kantante, vojaĝante. En 1995 al UK en Tampere iris kvin tiĥvinanoj, sed en 1998 al Monpeliero – jam pli ol dek! Daŭris reciproka vizitinterŝanĝo kaj alispeca kunlaboro kun la ĝemelurbaj esperantistoj. Kaj ne nur ĝemelurbanoj

venadis. En tiu jardeko tiĥvinanoj akceptis du amasajn landajn aranĝojn. Bone sukcesis SEJT en 1999, rikoltinta pli ol 250 partoprenantojn el multaj landoj. RET en 2004 kunvenigis multe malpli amasan partoprenantaron, sed estis unika almenaŭ pro tio, ke por saluti esperantistojn al la solena malfermo venis mem la urbestro.

Jen epizodo, aparte rakontinda. La urba muzeo de Rimskij-Korsakov unuan fojon en sia historio estis ekspoziciigonta sian havaĵon eksterlande, en Francio sub aŭspicio de UNESKO. Kestoj kun la aĵoj venis Parizan flughavenon akompanate de la direktorino kaj vicdirektorino, nia klubanino Elena Loĵkina. La inojn kaj la aĵojn iakaŭze neniu renkontis, do Elena decidis peti helpon per la sola telefonnumero, kiun ŝi kunhavis – tiu de la sidejo de UFE. La agema esperantistino, deĵoranta tie, “starigis sur la orelojn” duonon de Parizo, trovis kaj mokis la funkciulojn de UNESKO ktp. Rezulte, post horo venis pardonpetante la respondeculoj kun komforta buseto, kaj la problemo estis bele solvita, kio eĉ pli levis la aŭtoritaton de la klubo en Tiĥvin.

Same aparte emfazenda estas la fakto, ke en septembro 2001 tiĥvinaj esperantistoj akceptis la multurban kantistan teamon. En la sonstudio de la urba artlernejo estis registritaj la unuaj du kodiskoĵoj de la projekto “Oraj kantoj”.

La unua duono de la kvara

La jaroj 2006-2010 havis siajn atingojn kaj perdojn.

Ne mankis feliĉaj foriroj kaj funebraj forpasoj. Nia plej aktiva junulino, Julinka Litvinova, foredziniĝis al Belgio. Ni adiaŭis nian veteranon N.N. Zverev kaj travivis la ŝoke neatenditan sciigon pri forpaso de Volodja Gakalenko.

Sekvis strio de la jubileoj, – Nataŝa, Vera, Saŝa, Vasilij, Saŝa, Mikaelo, – festataj komune kaj gaje. Samkiel la tradiciaj juniaj elurbigoj kun kantoj, ludoj kaj nepraj ŝaŝlikoj. Ne mankis ankaŭ eksterlandaj gastoj, akceptataj foje per la samaj ŝaŝlikoj, alifoje – per ŝvitbanado, restoraciigado kaj ekskursoj.

Denove – du amasaj renkontiĝoj: REK-EOLA en 2007 kaj TEMoj en 2009. Impresoj de la partoprenintoj, publikigitaj en “REGo” estas ankoraŭ freŝaj en la memoro, do ne indas multe rakonti pri tio. Endas nur diri, ke la aranĝoj sukcesis grandparte pro la enteama laboro de niaj gejunuloj: Daŝa Vlasova, Anton Kirjakov, Rita Bistrova, Inga Krejson, Olga Tiĥomirova...

El inter specialaj atingoj menciindas la tradukmetiejo sespersona, faranta studojn dum du jaroj kaj fininta la laboron per kolektiva traduko de “La burgo kondamnita” de fratoj Strugackij. Ankaŭ registro de la disko “Printempo blujnsa”, ricevinta dank’ al la moskvanoj belan veston kaj multajn pozitivajn reeĥojn. Ankaŭ kelkaj televidelsendoj pri la klubo, sukcesaj turneoj eksterlande...

La klubo eniras en la duan duonon de sia kvara jardeko ne sen problemoj, sed firme starante sur la piedoj, kiel unu el nemultaj fortaj esperantistaj kounumoj en la lando.. Tio festindas, kaj la klubanoj invitas ĉiujn geamikojn al la tradicia Zamenhof-tago, kiu samtempe estos la jubilea vespero de la klubo. Bonvenon!

Mikaelo Bronŝtejn, novembro 2010

Suplemento: la dua duono de la kvara jardeko

Post malapero de la Esperanto-grupo en Viborg Tiĥvin restis la sola insulo de Esperantomovado en la Leningrada regiono. La fakto bedaŭrindas, sed ne estas kaŭzo por ĉesi nian agadon. Tiĥvinanoj daŭre aktivis, kaj la klubanoj vivo en la pasintaj kvin jaroj estis plena je interesaj eventoj.

La kurso por komencantoj kun lernantaro ne tro amasa (de 5 ĝis 10 personoj) tamen funkciis ĉiujare dufoje en ĉiu semajno kaj venigis en la klubon kelkajn novajn aktivajn membrojn. Regule en la tria ĵaŭdo de ĉiu monato krom la someraj okazadis la klubkunvenoj, kiujn vizitis – depende de la anoncita temo – de 10 ĝis 40 klubanoj.

Ankaŭ la tradicio de juniaj klubaj elurbiĝoj restis seninterrompa; du elurbiĝoj eĉ partoprenis niaj eksterlandaj gastoj.

Konstanta amika kontakto kun la ĝemelurba Esperanto-asocio de Herouville St Clair (Francio) daŭris senĉese surbaze de personaj amikaj ligoj plus individuaj kaj grupaj reciprokaj vizitadoj. I.a. seppersona grupo de la francaj samideanoj vizitis Tiĥvin en 2012. En 2014 ni estis invititaj por kunfesti la jubileon de la ĝemelurba asocio kaj la solenan malfermon de Esperanto-skvaro en Herouville St Clair. Pro diversaj kaŭzoj al la evento iris nur du klubanoj, sed la festo estis brila.

Plej efike kunigas kaj amikigas ĉiun ajn kolektivon la grava teama laboro. Tia iĝis por la klubo preparado de la vicaj Tiĥvinaj Esperanto-metiejoj (TEM-oj) en 2014. Al la kluba kerno por tiu laboro libervole aliĝis multaj geuloj provizore malaktiviĝintaj antaŭe, do la prepara teamo kreskis ĝis ĉirkaŭ dudek personoj. Spite al la politika situacio, malfavore maviĝinta en la komenco de la jaro, en la TEM-oj partoprenis pli ol 100 diversaĝaj esperantistoj el kvin landoj, kaj la programo efektiviĝis ne malpli interese ol tiuj de la antaŭaj amasaj aranĝoj en Tiĥvin.

Ho ve, ankaŭ perdoj okazis. La 1-an de majo 2015 dum kanotado tragike pereis unu el kernaj figuroj de la klubo Zoja Kaĉalova kun sia edzo... Forlasis la urbon por edziniĝi-patrinigi aliloke niaj junaj aktivilinoj Daŝa Vlasova kaj Rita Bistrova – la klubo bondeziras al ili!

La 22-an de decembro 2015 en la koncertejo de la Artlernejo Rimskij-Korsakov okazis solena vespero, dediĉita al 40-jariĝo de nia klubo. Krom la klubanoj la solenaĵon partoprenis multaj invititaj gastoj el amikaj urbaj asocioj – literatura unuiĝo “Tvorjanskoje sobranije”, poezia klubo “Avtograf” kaj amikeca asocio “Tiĥvin-Herouville”. Dank’ al la alirebleco skajpa, laŭtparoliloj kaj granda ekrano ĉiuj ĉeestantoj vidis kaj aŭdis salutojn, venintajn de niaj geamikoj el Danlando, Germanio, Francio kaj el multaj rusiaj urboj. Ne mankis la pianmuziko – de Rahmaninov ĝis Cfasman; inter la muzikaĵoj ni aŭdis la rememorojn de diversgeneraciaj klubanoj kaj salutojn de la amikaj asocioj. La solenan parton sekvis ĉetabla – kun tostoj, bondeziroj, komuna kantado kaj...

...kaj Tiĥvina Esperanto-klubo eniris pluvivas. La 28-an de decembro okazis vica leciono de Esperanto – la lasta en la jaro 2015 kaj la unua en la kvina jardeko de la klubo.

MB, la 2-an de januaro 2016



Klara Ilutoviĉ jubileas

La 14-an de januaro 2016 nia fama Esperanto-poetino Klara Sergeevna Ilutoviĉ festas sian jubileon. Ni elkore gratulas ŝin, kaj publikigas la gratulajn versojn de Mikaelo Bronŝtejn.

*La nova sento nian mondon ne forlasas,
veninte iam de la majstro Zamenhof’.
Marĝene, milde kaj modeste ĝi trapasas,
sed tio tute ja ne estas katastrof’.*

*De poezio via milda gut’ malgranda
batadas arde kontraŭ la granita dur’.
En trezorej’ de l’ poezio esperanta
sendube klare gravuriĝos ĝia spur’,*

*ĉar por transformi simplan temon en eventon
kun sentoj puraj kaj kun filigrana bel’
posedas vi scipovon raran kaj talenton,
kaj ni fieru, ĉar ĝi, certe, fontas el*

*la moskva skolo, estimata jam tutmonde,
resurektinta post jardekoj de l' sufer'.
Kaj ne tro gravas, ke apenaŭ venas mon' de
l' verkado, se ĝojigas koron la afer'.*

*Do restu plumo via vigla kaj senknara
dum multaj jaroj por la hela poezi'.
Samkiel via nom' la vivo estu klara
kaj la kread' alportu ĝuon plu al vi.*

Mikaelo Bronŝtejn

Rusiaj amaskomunikiloj pri Esperanto

En la Interreto

“Что такое эсперанто?” Ruslingva artikolo pri Esperanto kaj fine amuza video pri Zamenhof: <https://hotshowlife.com/chto-takoe-esperanto/>

Мемория. Людвик Заменгоф Ruslingva artikolo pri Zamenhof okaze lia naskiĝtago: <http://polit.ru/news/2015/12/15/zamengof/>

Informis Boris Kolker

En historia libro

Militestroj-revoluciuloj / Leonid Mleĉin – SPb.: SLR "Komerco-eldona domo "Amforo", 2015. 288 p. (Serio "Grandaj rusianoj") [Полководцы-революционеры / Леонид Млечин. – СПб.: ООО "Торгово-издательский дом "Амфора", 2015. 288 с. (Серия "Великие россияне").] ISBN 978-5-367-03368-7 (Serio) ISBN 978-5-367-03512-4

Paĝo 153

[...] Kiam juna menŝovisto Viŝinskij – partia kromnomo Jurij – en 1908 troviĝis en bakua malliberejo, en la sama kamero kun li kuntroviĝis bolŝevisto de tre malsarena aspekto. Laŭ la dokumentoj li estis Gijoz Nijaradze. Kunkameranoj nimis lin Koba. Lia vera familinomo estis Dĵugaŝvili. En la partia gazetaro li verkis sub pseŭdonomo Stalin. Pasigante la puntempon, li okupiĝis pri lernado de artefarita internacia lingvo Esperanto – tiam laŭmoda interrevoluciuloj (kio ne malhelpis al li poste neniiĝi esperantistojn kiel alilandajn spionojn). [...]

Стр. 153

[...] Когда молодой меньшевик Вышинский – партийная кличка Юрий – в 1908 году сидел в бакинской тюрьме, в одной камере с ним оказался большевик весьма угрюмого вида. В документах он значился Гийозом Нижарадзе. Сокамерники именовали его Кобой. Настоящая его фамилия была Джугашвили. В партийной печати он писал под псевдонимом Сталин. Отбывая срок, он занимался изучением модного тогда среди революционеров искусственного международного языка эсперанто (что не помешало ему впоследствии уничтожить эсперантистов как иностранных шпионов). [...]

Informis Vladimir MININ

Kazano: Esperanto aŭ Nazarbajev?



La 3an de decembro la kolegio (organo) de la Supera Kortumo de Tatarstano en Kazano traktis apelacion kontraŭ la decido de la juĝejo de la Vaĥitova distrikto de Kazano, kiu la 12an de aŭgusto 2015 malakceptis plendojn de urbanoj kontraŭ la

ŝanĝo de la stratnomo Esperanto al Nazarbajev kaj lasis valida la decidon de la urba plenumkomitato pri la nomŝanĝo.

Kvar kazananoj (Ildar Kijamov, Zufar Garipov, Nina Pisanova kaj Natalja Ĥarĉenko) prezentis raciajn kaj emociajn argumentojn kontraŭ la ŝanĝo de la stratnomo, kaj la reprezentantino de la urba plenumkomitato Julia Biktimirova klarigis la pravecon de la okazinta ŝanĝo. Aŭskultinte ilin, la kolegio decidis ne kasacii la aŭgustan juĝverdikton, kaj do la nomo de la eksa strato Esperanto restas strato Nazarbajev.

La plendintoj nun havas ses monatojn por apelacii ĉi tiun decidon en la Supera Kortumo de Rusio.

Aleksander Korĵenkov

<http://sezonoj.ru/2015/06/kazano-2/>

Ĉi tiu artikolo aperis en la januara kajero de *La Ondo de Esperanto* (2016).

In memoriam

Forpasis Elena Ŝevĉenko



La 5an de septembro post longa malsano en Moskvo forpasis Jelena Georgijevna Ŝevĉenko (1962-2015), konata Sovetunia kaj Rusia esperantistino, kunfondinto de la Moskva eldonejo “Impeto”, dank’al kiu aperis dekoj da esperantlingvaj libroj. Ŝi estis tre aktiva REU-ano, plurfoje – estrarano de nia asocio; ŝi dum longa tempo plenumis tre komplikan funkcion de ĝia librotenisto, kio ne tro rimarkeblas deekstere, sed treege gravas por normala ekzisto de la organizo. Ni ĉiam memoros ŝin! Kondolencojn al Dima kaj Anja kaj fortojn por daŭrigi la aferon de la

gepartoj!

Forpasis Irina Mironova



La 15an de novembro post nelonga malsano forpasis Irina Leonidovna Mironova (1949-2015), la edzino de Valentin Melnikov, aktiva esperantistino, muzikistino kaj agrabla kvieta homo. Helan memoron al ŝi! Fortojn al Valentin, kies vera fidela amikino, helpantino kaj amantino ŝi estis dum pli ol 19 jaroj.

Internaciaj informoj

Internacia Infana Kongreseto (IIK)

okazos norde de Nitro, nur 4 km de UK-ejo, en [veterinara lernejo](#) kun granda tereno. Ni manĝos en granda salono kaj dormos en 2-3-litaj ĉambroj.

Gepatroj de junaj infanoj povas dormi kun siaj infanoj en la sama ĉambro kaj matene veturi [per buso](#) al UKejo.

Ni disponas pri pluraj lokoj por sporto kaj ludoj, ni povas prizorgi diversajn bestojn.

La nunaj prezoj estas 180 € por A-lando kaj 130 € por B-lando. La aliĝperiodo finiĝos baldaŭ.

Grupoj, helpantoj kaj pluraj infanoj el sama familo havas rabaton de 15 %.

La skipon gvidas hungarino Veronika Acsádi,

pri manlaboro zorgos belgino Nicky Janssen,

venos koreino Ana Songanta Shin Eunsook por prepari la korean IIKon 2017.

Ni serĉas helpantojn, ekz. sportemulo (sportinstruisto), vartist/in/o kaj ĉiun kiu ŝatas infanojn.

Por kontakto skribu rekte al: infana.kongreseto@gmail.com

INTERNACIA ESPERANTO-KALENDARO PRI ESPERANTO-RENKONTIĜOJ, KONGRESOJ, FESTIVALOJ!

La "Internacia Kalendaro" listigas ĉiujn konatajn Esperanto-renkontiĝojn, kiuj akceptas vojaĝemajn esperantistojn.

ADRESO DE LA KALENDARO: <http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm> [1]

- Serĉu por vi simpatian Esperanto-aranĝon, kaj vojaĝu partopreni ĝin!
- Dum via labora aŭ turisma vojaĝado trovu Esperanto-aranĝon en via proksimeco!
- Se vi organizas Esperanto-aranĝon, per kontrolo en kalendaro evitu la koliziojn kun aliaj renkontiĝoj!

Registru mankantan renkontiĝon senpage kaj simple, pere de formularo en la komenco de la kalendaro listo!

La Internacia Kalendaro funkcias teamo de la Esperanto-Centro "Eventoj" en Budapeŝto.

Kiel vi povas helpi?

- Per registrado de aranĝoj: informu pri mankantaj aranĝoj, aŭ sendu korektojn/aktualigojn pri ili!
- Helpu diskonigi la Kalendaron! Aperigu ĝian emblemon kaj faru ligilon al ĝi en via retejo!
- Ŝatu aŭ kundividu la kalendaran retejon en sociaj retoj kiel Facebook!

Adreso de la Kalendaro: <http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm> [1]

László Szilvási

GAJNIS la nomo ESPERANTO – en la voĉdonado

La pola ŝtata fervoj-entrepreno akceptis la trajno-nomon ESPERANTO! En la fino de la voĉdonado, anoncita semajnon antaŭe, la nomo Esperanto havis 3940 voĉojn, la nomo Narew 2509 voĉojn, Bojary 200 voĉojn.

La interurba rapidtrajno "IC Esperanto" funkcios ekde decembro, kaj denove aŭdeblas la nomo Esperanto en polaj stacidomoj. (Pli frue jam funkciis trajno kun la sama nomo inter Białystok kaj Warszawa, sed ĝi estis nuligita en junio 2013, ĉar uzis ĝin nesufiĉe multaj pasaĝeroj.)

KORAN DANKON AL ĈIUJ VOĈDONINTOJ EN LA TUTA MONDO!

Via voĉdono multe helpis en la diskonigo de Esperanto en la pola ekstermovada medio. Sen via helpo la sukceso ne estus atingita!

En <https://www.facebook.com/PKP.Intercity?ref=stream> estas publikigitaj la akceptitaj nomoj de ĉiuj 10 trajnoj, por kiuj fejsbukanoj voĉdonis:

1. Warszawa – Białystok --> Esperanto
2. Warszawa – Olsztyn --> Kortowo
3. Warszawa – Łódź --> Uszatek
4. Warszawa – Łódź --> Deyna
5. Gdynia – Wrocław --> Bursztyn
6. Gdynia – Wrocław --> Błyskawica
7. Katowice – Poznań --> Koziółki
8. Warszawa – Bydgoszcz --> Łuczniczka
9. Warszawa – Bydgoszcz --> Kujawiak
10. Warszawa – Lublin --> Bystrzyca

Sinceran dankon al ĉiuj kunlaborintoj, voĉdonintoj!

Szilvási László